

scienco revuo

volumo 37 (1986)

oficiala organo de
internacia scienca asocio esperantista
(isae)

Pizo (Italujo), 1986

SCIENCA REVUO, vol. 37 (1986), n-ro 2 (152)

Pri nove proponataj afiksoj el la vidpunkto taktika

Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)*

1. Enkonduko

Temas pri jeno: Sciencistoj aplikantaj Internacian Lingvon proponas, de tempo al tempo, **novajn** afiksojn strebe al raciigado terminologia. Do ne temas ĉi tie pri proponoj, kiel utiligi — sur la sama kampo — afiksojn zamenhofajn aŭ aliajn, jam tradicie naturalizitajn. Pri ŝanco de tiuj mi skribis jam aliloke (1984), tamen aldoninte averton al eksperimentemuloj, kiuj dezirus inventi kaj oficialigi pluajn afiksojn. Nun mi revenas al ĉi averto por ekspliki la situacion el la vidpunkto taktika.

2. Solvoj bonŝancaj

El amasego da nove proponitaj afiksoj bone enhejmiĝis nur kelkaj. Mi menciuj almenaŭ tri sufiksojn el la sfero biologia.

En la zoologia nomenklaturado helenlatina la takson-nomoj por la familioj finiĝas je *-idae*, por la subfamilioj *-inae*. *Wüster* siatempe proponis apliki en Esperanto la respektivajn sufiksojn *-oid-* kaj *-oin-*. *Stöp-Bowitz* (1969, en PIV 1970) atentigis, ke la propono ne estas akceptebla, ĉar *-oid-* en la zoologia nomenklaturado funkcias alimaniere. Dezirante — same kiel *Wüster* — eviti homonimecon kun la komunlingvaj sufiksoj *-id-* kaj *-in-*, li trovis solvon tre bonŝancan: *-ed-* kaj *-en-*. Per ili la modifo de la latinaj originaloj ja ne estas tro drasta, do ne difektas ties rekoneblecon. Ekz.: La familio de **musteledoj**, estas dividita en la subfamiliojn de **mustelenoj**, al kiu apartenas la genroj

* D-ro de natursciencoj, kandidato de tehnikaj sciencoj, emerita ĉefo de specialgeologia esplorcenro, *Lužná 7, 16000 PRAHA 6 — VOKOVICE*

mustelo, melo k.a., kaj de **lutrenoj**, al kiu apartenas la genroj lutro k.a.. Post 15 jaroj da PIV-ekzistado eblas konkludi, ke la propono de *Stop-Bowitz* bone akceptiĝis. Ne estas probable, ke iu zoologo-esperantisto penos inventi solvon alian.

La samon oni povas aserti pri la famili-noma sufikso -ac- en botaniko. Tiun proponis *Neergaard* (1969, en PIV 1970). Ĉi-okaze estas menciinde, ke la latina nomenklaturado disponas pri -aceae. *Albault*, en privata letero adresita al mi (1983), prave atentigis, ke en Esperanto devus esti ne -ac-, sed -ace-, do brasikaceoj, ne brasikacoj. Nu, tamen ŝajnas, ke -ac- jam firme establiĝis.

3. Propoj logikaj, sed...

Popov (1984) venis kun spritega propono: Kvankam la ĥemiaj terminoj, ekz. hidroksilo, karboksilo, metilo, etilo k.t.p. finiĝas je -il-, tamen ilia hiperonimo (superordigita termino) estas radikalo, kvazaŭ ĝi koncernas aldehidojn, ekz. etanalo propranaló k.t.p. Laŭ *Popov* do estus absolute logike, se anst. radikalo oni aplikus la terminon "radikilo". Tiu ĉi rezono estas nepre ĝusta, kvankam neglektanta la homonimecon kun la zamenhofa -il-.

Sed pli grave: Kial *Popov* publikigis la proponon en esperantlingva revuo, turnante sin esklude al interesatoj pri ĥemia terminologio (nomenklaturado) en Internacia Lingvo? Esperanto ja ne estas kompetenta solvi ĉi-specajn problemojn, sed jes kompetentas sole *IUPAC* (*International Union of Pure and Applied Chemistry*) kaj *ISO* (*International Standardizing Organization*).

Konekse kun tiu ĉi demando mi rememoras pri artikolo de *Roelofs* (1950), la tiutempa redaktoro de *SCIENCA REVUO*. Li mencias leteron de *Duncan* kritike al la propono de *Zikmund* (1948), recenzita ankaŭ de *Roelofs* (1949). *Duncan* tiam skribis: "Kiel sistemo de nomenklaruro, la sistemo de *Zikmund* havas allogajn ecojn, sed estas nenia ŝanco, nenia ebleco, ke la naciaj lingvoj akceptos ĝin, kaj estus tragedio, se Esperanto akceptus kaj uzus tute alian sistemon, ol la naciaj lingvoj."

Mi aldonas, ke tiaspeca tragedio ne okazis kaj certe ne okazos, ĉar Esperanto, kiel lingvo vivanta, ĉiam estos en bonega kontakto kun la lingvoj naciaj. Tamen ne lasas min trankvila tiu fakto, ke preskaŭ 40 jarojn post *Zikmund* ne sole *Popov*, sed ankaŭ *Pióro* (ekz. 1966, 1970, 1980, 1984) kaj pluraj aliaj sugestas reformojn en la ĥemia nomenklaturado, sen turni sin kun tiaspecaj proponoj rekte al *IUPAC* kaj *ISO*. Ja ne estas afero de Esperanto, enkonduki ekz. la nomon "ferio" anst. la zamenhofa: fero. Dependas de la normi-

gaj institucioj, ĉu ili emos akcepti la novismon "ferrium" anst. la tradicia latina "ferrum", tiel reguligante la ĥemi-elementan nomaron per la sufikso -i-.

4. Propoj eĉ pli drastaj...

Mi ankoraŭ restu ĉe ĥemio kaj ĉe *Popov*, kiu antaŭ nemultaj jaroj petis la redakcion de *SCIENCA REVUO*, ke ĝi publikigu lian artikolon pri nova sufikso -ac- por acidoj. Kvankam temis pri tre erudita, renoma kaj ŝatata kontribuanto al SR, la tradiciaj principoj esprimitaj de *Roelofs*, *Duncan* k.a. ne permesis identiĝi kun tiu ĉi drasta interveno en la ĥemian nomenklaturon. La principoj estis zorge eksplikataj en letero adrese al *Popov*. Tamen li ne lasis deturni sin de sia ideo kaj publikigis la proponon en *MEDICINA INTERNACIA REVUO* (1983) kaj en *EL POPOLA ĈINIO* (1983)* La negativaj reĥoj atendeble sekvis post nelonga tempo. *Nijveld*, la redaktinto de la ĥemiaj terminoj en PIV, reagis en *BUDAPEŝTA INFORMILO* (1984) kaj en *EL POPOLA ĈINIO* (1984), esprimante analogan opinion al tiu, kiun estis formulinta siatempe *Duncan*. Aldoniĝis la kritikoj de *Warszawski* (1984), *Pluhař* k.a.

Do, anstataŭ prezenti siajn — nepre ne ĉial malbonajn — proponojn al *IUPAC*, *Popov* entreprenis senbazan diskuton en esperantlingva gazeto, kies rilato al ĥemio estas ne pli ol hazarda (1985). Eĉ li apelacias al *IUPAC*, misformante ĝian nomon ("IUPAK"), spite al la principoj de fidela referencado. Antaŭ la publiko esperantista li argumentas per la normiga institucio, kiu evidente neniam scias pri lia propono... Jen papero surprisita apenaŭ utile, ĉar oni neniam povos definitive solvi la demandon sur la forumo nekoncerna, nekompetenta, ne kapabla ion normigi, rekomendi, dekreti...

Konstateble, la ĥemiistoj-esperantistoj emas al sendisciplina eksperimentado, dum la zoologoj kaj botanikistoj pli volonte obeas siajn internaciajn nomenklatur-kodojn. En tia situacio verŝajnas, ke ankoraŭ dum longa tempo regos ĥaoso en la esperant-lingvaj ĥemiaĵoj. La ĉefan kaŭzon mi vidas en tio, ke ĝis hodiaŭ ne kreiĝis Ĥemia Sekcio de ISAE. La 20-jara kunlaborado de geologoj en Geologia Sekcio de ISAE garantias, ke inter tiuj fak kolegoj apenaŭ ekzistas gravaj terminologiaj malakordoj. Denove mi rememorigu intere-

* Interese, ke — sen referenci pri *Popov*, en "Aldonaĵo B" al tre ampleksa traktajo — *Portmann* (1983) prezentas la acidsufiksojn -ac- kaj -ic-, ĥarakterizante ilin kiel "neortodoksajn proponojn."

satojn pri terminologia laboro, ke ne estas rekomendinde labori esklude super terminaroj, sed ke oni samtempe devas verki original-esplorajn artikolojn, en kiuj montriĝas taŭgeco (evt. maltaŭgeco) de enkondukataj terminoj. GS-ISAE jam aŭspiciis kvin volumojn de GEOLOGIO INTERNACIA kaj en 1986 aperigos la 6-an. Jen forumo ebliganta ellabori esperantlingvan terminologion de la geologiaj sciencoj. Ne malpli bone kondukas la medicinistoj, kunlaborantaj en UMEA kaj ĝia organo MEDICINA INTERNACIA REVUO.

La rezultoj en botaniko, zoologio, medicino, paleontologio, ĥemio, mineralogio, petrologio kaj geologio estas — el la vidpunkto taktika — komparendaj, ĉar ĉiuj ĉi sciencoj strikte baziĝas sur la nomenklaturaj helenlatinaj. La ŝlosilo de sukceso konsistas do ĉefe en la obeado de internaciaj kodoj kaj — memkomprene — en pacienca kunlaborado de diverslandaj samfakuloj.

5. Ĉu radikparto aŭ amatore inventata afikso?

Tiun ĉi demandon mi esploris jam en la supre menciita traktaĵo el mia plumo (1984). Se mi revenas nun al ĝi, do sole pro tio, ke eĉ lastatempe ne ĉesis provoj interpreti evidentajn radikpartojn kiel nove enkondukendajn afiksojn. Ekz. mi aludis, ke -it- estas oftega radikparto en la nomoj de teĥnologiaj substancoj, sed ke precipe ni renkontas ĝin en la nomenklaturaj mineralogia, petrologia kaj paleontologia (ekrazito, eternito, iperito, aragonito, granito, baŭksito, hipurito, trilobito k.m.a.). Tute ne pravas *Piĉ* (1984), vidanta en -it- sufikson. Esperanto ja adoptas la pretajn radik-kliŝojn (kunmetitajn el koncerna praradiko plus la prasufikso -it-), kreitajn do ekster ĝi kaj kodigitajn laŭ internaciaj konvencioj. Ne ekzistas precedento pri produktiva kapablo de tia specia -it- en Esperanto. Kiu geologo aŭdacus nomi verdajn mineralojn helpe de la termino “verditoj”, sabloŝtonon bapti per “sablito”? Tiu elmetus sin en la plej bona okazo al moko, en la malplej bona al akuzo pri absoluta nomenklatura sendisciplineco.

Al analoga miskompreno apartenas la redakta noto de *Pluhař* post mia jam dufoje menciita traktaĵo (1984). Mi rekomendis “ne oficialigi novajn afiksojn”, sed li referencis al la moderna sistema ĥemia nomenklaturado, kiu ne estas imagebla sen granda arsenalo de afiksoj. Denove mi devas emfazi: Ĉi-specaj afiksoj ne estas produktataj en Esperanto, ĉar kliŝe transprenataj el la sistemo de IUPAC. Se ekz. -an- estus produktiva, esperantistoj devus la saturitan hidrokarbonidon “oktan-on” nomi simple “ok-an-o”! Se tamen restas la interna-

cia nomo “oktano” ankaŭ en Esperanto, oni rajtas konkludi, ke tie -an- estas nenio alia ol radikparto, kiun apartigi ne estas permesite.

Plej sisteman provon pri “dishakado” de helenlatinaj vortoj kaj pri memstarigado de tiel akiritaj vorteroj prezentis *Halvelik* (1984). En lia monumenta sistemo troviĝas vera inundo (72!) de afiksoj. Inter ili renkonteblaj estas tiel la normalaj radikpartoj (ekz. -id- en karbido), kiel aliaj, grave misformitaj (ekz. -eŭn- en “benzeŭno”, t.e. benzeno). Kvankam nepre ne senutilas trakti tiun ĉi verkegon de tre diligenta aŭtoro, tamen neniu kredos, ke ĝi kapablas — dum proksimaj jardekoj — konsiderinde influi la ekzistantajn terminarojn kaj nomenklaturajn.

Mi devas nur regurdi la saman refrenon: Domage, ke anstataŭ verki cele al kreado de propraj sistemoj, oni ne dediĉas sin al pli utila okupo, ekz. kunlaborado en kadre de internaciaj normigaj institucioj.

Halvelik ja ne estas sola, kiom koncernas la dishakadon de helenlatinaj vortoj. Sur ĉi kampo konsiderinde “renomiĝis” ankaŭ la jam menciita *Piĉ*. Ekz. en lia artikolo de 1982 oni trovas 41 memstarajn vorterojn, kiuj — laŭ lia aserto — estas libere kombineblaj. Li nomas ilin diverse: afiksoj, interjekcioj, prepozicioj, prepoziciaj duopoj, adjektivoj. Por liveri imagon pri la pensmaniero de *Piĉ*, sufiĉu jenaj du ekzemploj: tele = prefikso kun la senco “efikanta jedistance”, do teleparoli, teleamo k.s.; -un- = “sufikso signanta animalon de vira, maskla genro”, do hunduno, t.e. virhundo. Kvankam treege fekunda, kiom temas pri analizado de vortoj kaj inventado de afiksoj, tiu ĉi aŭtoro neniam serioze kunlaboris super scienca terminologio. Bonŝance, li aplikas sian afiksosistemon esklude en la sfero beletra, produktante ekstravagancan lingvaĵon. Ĉi-koncerne, Rikardo Ŝulco (1985) trafe parolas pri “litomiŝla dialekto”, laŭ la romano de *Karel Piĉ*: Litomiŝla tombejo. Mi tre ĝojas, ke la kritika voĉo venas de la beletristo Ŝulco, kiu esprimas sin jene: “Tiu romano estas malesperiga afero. Ĝi neniigas vin. Kaj via amata Esperanto fremdiĝas al vi. Ĝi ne plu ekzistas...”.

6. Konkludo pri taktiko

Esperanto disvastiĝis ne sole pro siaj lingvokvalitoj, sed ankaŭ dank’ al la prudenta kaj singarda taktiko de *Zamenhof*. Lastatempe la esperantologoj dediĉas pli kaj pli da atento al la faktoroj eksterlingvaj, kiuj efikas sur progreson (aŭ malprogreson) de planlingvo. Inter tiuj esperantologoj laŭmerite el-

staras *Blanke* (1979, 1984 k.m.a.).

Ne ĉiam entuziasmulo, antaŭ nelonge malkovrinta utilegon de Esperanto, konscias, ke per sia fervoro li povus endanĝerigi la reputacion de la zamenhofa invento. Elpensante novajn afiksojn, bonintence li deziras "pliriĉigi kaj pliraciigi" la lingvostrukturon. Iom li forgesas, ke la lingvo estas subtilega organismo, kies hirurgiaj operacioj devus okazi per kunlaboro kaj sub kontrolo de la plej kompetenta specialista stabo. Kaj nepre li forgesas, ke rolas ĉefe eksterlingvaj koneksoj en la nuntempa batalado de Esperanto cele al oficialigo en la sciencaj kaj teknikaj sferoj.

Ĉiu el ni — la sciencistoj aplikantaj Esperanton — trapasis sian esperantistan "infanaĝon", dum kiu li emis "pliperfektigi" la lingvon per novaj afiksoj. Bonŝance, nur esceptuloj ne sukcesis rezisti la tenton kaj publikigis siajn "inventojn". La ceteraj pacience maturiĝis kaj nur poste komencis labori sur pli supera kaj pli serioza nivelo.

Esperable, el miaj konsideroj klare evidentiĝis, ke neniel mi deziras fortimigi bonajn lingvokonantojn de raciigaj iniciatoj. La lingvo neniam estos sufiĉe perfekta, do oni agu, sed esklude en kadro de kompetentaj institucioj, kies tasko estas normigado de terminoj. Oni ne inundu la Esperanto-gazetaron per pledoj pri tiu aŭ alia private elpensita "sciencia" afikso.

7. Referencoj

- Blanke, D.* (1979): La lingvoscienco kaj planlingvoj. En: La internacia lingvo — sciencaj aspektoj. — Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko, 23-41. *Berlin*.
- Blanke, D.* (1979): Interlingvistiko kaj interlingvistikaj esploroj. — En la sama libro, 42-57.
- Blanke, D.* (1979): La Esperanto-movado kaj sciencaj esploroj, tezaĵo konstatoj kaj proponoj. — En la sama libro, 100-110.
- Blanke, D.* (1985): *Plansprachen in Theorie und Praxis*. — Akademie-Verlag. *Berlin*.
- Halvetik, M.* (1984): Normigado de helenlatinaj terminoj en Esperanto. Parto I. Analizo. Parto II. Sistemo. — Serio "Totala Esperanto", n-ro 1. Aŭtor-eldono. *Borgerhout*.
- Kavka, J.* (1984): Kioma ŝanco por Esperanto-afiksoj en scienca terminologio? — Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (AEST), 140-151. Ĉefa Esperanto-Asocio, scienca-teĥnika sekcio. *Brno*.
- Nijveld, W.J.* (1984): Leteroj pri la artikolo "La sufikso por acidoj". — BUDAPEŝTA INFORMILO, 6/7, 13. *Budapest*.
- Piĉ, K.* (1982): Lingvaj rimedoj de la esperanta prozo. — Kolekto de referaĵoj el la internacia SEMINARIO PRI APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (SAEST), 80-86. *České Budějovice*.
- Piĉ, K.* (1984): Principoj de Esperanto. — Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (AEST), 152-160. *Brno*.

- Pióro, J.* (1980): Ĥemiaj afiksoj internaciaj. — *Wydawnictwa naukowo-techniczne*. *Warszawa*.
- Pióro, J.* (1980): Internacia kemia nomenklaturado. — Aŭtor-eldono. *Varŝavo*.
- Pióro, J.* (1981): Kemia nomenklaturado esperanta. (Reparato). — aŭtor-eldono. *Varŝavo*.
- Pióro, J.* (1984): Elektitaj aspektoj de ĥemia nomenklaturado Esperanta. — Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (AEST), 161-167. *Brno*.
- PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (PIV). Ĉefred. *G. Waringhien*. — SAT. *Paris* (1970).
- Popov, M. T.* (1982): La sufikso por acidoj. — *MEDICINA INTERNACIA REVUO*, 75-76. *Gunma-ken*.
- Popov, M. T.* (1983): La sufikso por acidoj. — *EL POPOLA ĈINIO*, 6,18. *Beijing*.
- Popov, M. T.* (1984): Ĉu radikalo aŭ radikilo? — *MEDICINA INTERNACIA REVUO*, 1, 39. *Gunma-ken*.
- Popov, M. T.* (1984): IUPAK kaj Esperanto. — *MEDICINA INTERNACIA REVUO*, 73. *Gunma-ken*.
- Popov, M. T.* (1985): IUPAK kaj Esperanto. — *EL POPOLA ĈINIO*, 10,24. *Beijing*.
- Portmann, D.* (1983): Pri la esperanta kemia nomenklaturado de la acidoj, precipe organikaj. Nesolvitaj problemoj. — *ACADEMIAJ STUDOJ*, 105-145. *Esperanto-Press, Bailieboro*.
- Portmann, D.* (1983): Neortodoksaj proponoj pri acidnomo. — *MEDICINA INTERNACIA REVUO*, 168. *Gunma-ken*.
- Roelofs, W. P.* (1949): Proponoj por kemia nomenklaturado esperanta. — *SCIENCA REVUO*, 11-117. *Purmerend*.
- Roelofs, W. P.* (1950): Ankoraŭ pri kemia nomenklaturado. — *SCIENCA REVUO*, 39-40. *Purmerend*.
- Ŝulco, R.* (1985): Pledo por unueca lingvo. — Esperanto-Centro. *Paderborn*.
- Warszawski, A.* (1984): Leteroj pri la artikolo "La sufikso por acidoj". — *EL POPOLA ĈINIO*, 1, 42-43. *Beijing*.
- Warszawski, A.* (1984): Pri la nomoj de ĥemiaj elementoj en Esperanto. — Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO (AEST), 168-174. *Brno*.
- Zikmund, M.* (1948): *Návrh na změnu chemické nomenklatury anorganických sloučenin v esperante*. — *Chemické zvesti*, 2, 279-288.

O nově navrhovaných afiksech z hlediska taktiky

Stále se v esperantském tisku objevují návrhy na zavádění dalších afiksů pro potřeby vědecké terminologie. Bohužel často jde o takové, které jsou v přímém rozporu s uznávanými normami terminologickými (nomenklatorickými). Mezi vědci opírajícími se hlavně o řeckolatinskou terminologii smutně vynikají esperantisté-chemikové, kteří se domnívají, že esperanto se nemusí řídit platnými kódy, nýbrž že může mít lepší řešení než národní jazyky. Těmto reformátorům je třeba připomínat, že kompetentními v takových případech jsou pouze IUPAC a ISO, nikoli fóra výlučně esperantská.